# voko el stirio

Bulteno de la Esperanto-movando en Stirio kaj de la Esperanto-Societo "Unueco" Graz

Mitteilungsblatt der Esperanto-Bewegung der Steiermark und des Esperanto-Vereins "Einigkeit" Graz

**N-ro 382** **aŭgusto / August 2026** ZVR447438603


# La 111-a UK en Graz





La 111-a mondkongreso de Esperanto en Graz entuziasmigis 1104 partoprenatojn el 62 landoj – tio estas rondcifere triono de la mondo. Ĉe la inaŭgura solenaĵo en la plene okupita Stefaniensaal la prezidanto de la Esperanto-societo Stirio Ewald Schick bonvenigis la gastojn kun la UEA-

prezidanto Fernando Maja Jr. kaj ankaŭ la ĝeneralan sekretarion de la aŭstria UNESCO-komisio Martin Fritz kaj Margaret Zeleski-Zamenhof la pranepino de Ludwig Zamenhof. Unuafoje en la historio de la UEA la monda kongreso okazis en la jaro de la agnosko de Esperanto kiel „immaterielles Kulturerbe“.

Ankaŭ tio aspirado estis sukcesplene plirapidigita de la Graza klubo kun Ewald Schick kaj Martin Gritsch, kiu kiel antaŭulo de Schick la Graza klubon multjare de sia profesia kampo de akticveco ĉe la EU-komisio en Bruselo kondukis.

Kiel eksterordinara kliniĝo antaŭ la historio de la Graza klubo ankaŭ la historia Esperanto-flago estis hisata, kio okaze de la 100jara Esperanto-jubileo flirtis de la Graza horloĝturo.



## Esperanto-arbo en parko de la Volksgarten



Speciala Esperanta arbo estis plantita en la parko de Volksgarten. La Platane orientalis estas optime taŭga por la klimataj kondiĉoj kaj estonte daŭra signo de internacia kompreniĝo, amikeco kaj paca interŝanĝo de nia lingvo. Kun ĝia verda arbkoloro kaj proksimume 300 jaroj vivekspekto ĝi estas bona simbolo por la tradicia verda koloro de esperanto.




## Urbestrina aŭdienco en la urbdomo

En la historia kunsida salono de la urbdomo okazis la oficiala aŭdienco kun UEA-prezidanto Fernando Maia kaj ĝenerala sekretario Aleks Kadar. En anstataŭado de la ferianta urbestrino Elke Kahr la municipa konsilantarino Elke Heinrichs eĉ bonvenigis nin en Esperanto kaj ĝojis, ke tiel multaj internaciaj gastoj venis al landa ĉefurbo. La Graza turisma-ĉefo Dieter Hardt-Stremayr donis al Ewald Schick turisman broŝurojn kun orfolio, kiuj nun estos vojmontriloj en la tuta mondo. Jam dum la gazetara konferenco antaŭ la kongreso Dieter Hardt-Stremayr akcentis, ke sen nia Esperanto-iniciativo oni ne estus atinginta la tutmondan publikecon.



## La internacia vespero



Je la antaŭlasta tago peris parteprenantoj de la tuta mondo kun muzikaj kontri-buaĝoj malgrandajn en-rigardojn en la kulturo de la kulturoj de la iliaj landoj. Oni povis vidi kaj audi kantadon, skeĉojn, poezi-aĵojn, kaj dancon ĝis homoj de la tuta mondo dancis sur la placo de la kongrescentro.



## Finiĝa solenaĵo

Kulminoj de la finiĝa solenaĵo estis la transdono de la flago al la prezidanto de la Aŭstralia Es-peranto Asocio Sandor Horvath kiu preparos la 112an mond-kongreson en Melbourne. Ewald Schick honoris kun honor-dokumentoj ankaŭ la plej maljunajn Grazajn Esperan-tistojn kortega konsilisto d-ro Klaus Perko, d-ro Heinz-Paul Kovacic kaj Karlo Reinisch, kiuj dum jardekoj batalis por la internacia lingvo. Kun granda bonkoreco la UEA-prezidanto Fernando Maia ankaŭ aliĝis la honoradon. La Graza komu-numa konsilantarino Elke Heinrichs kiu anstataŭis la urbestrinon faris la adiaŭan paroladon denove en Esperanto.



***Fotoj de ĉefredaktoro Mag. Herbert Kampl***

*Karaj geamikoj,*
*kiel estro de la Esperanto-Societo Stirio kaj prezidanto de AEF mi kun granda ĝojo dankas antaŭvice al LKK sub gvido de Norina Schantl, same al Kongresa Fako kiel ankaŭ al mia kara amiko Herbert Kampl kiu informis la amaskomunikilojn kaj precipe al la helpantoj sub gvido de Vlasta Pištíková.*
*Vere sen la laboro de la helpantoj ne povis okazi tiu-ĉi unika UK 2026 en Graz.*
*Ĝis nun ĉe neniu Universala Kongreso mirinde okazis, ke landa UNESKO-Komisiono oficiale agnoskis la Esperanto-kulturon kiel nemateria kultura heredaĵo - kiel proklamis la ĝenerala sekretario de la Aŭstra UNESKO-Komisiono, Martin Fritz.*
*Ankaŭ mi koregе dankas al mi kara amiko Martin Gritsch kiu subtenis tiun-ĉi laboron.*
*Kompreneble ankaŭ mia danko iras al la estraro de UEA, same mi kore dankas pro subteno de la turisma oficejo al Dieter Hardt-Stremayr, kiel ankaŭ al urbestrino Elke Kahr.*
*En la solena malfermo de la kongreso, komunuma konsilistino Elke Heinrichs anstataŭis la urbestrinon. Ŝi ankaŭ salutis niajn partoprenantojn en Esperanto.*
*Aparte mi ĝojas, ke en Melburno okazos la venonta UK ĉar tie mia mentoro Sandor Horvath estas la prezidanto de la Australia Esperanto-Asocio.*
*Valore mencii: Unuafoje okazis en publika transporto - en ĉiuj tramoj kaj busoj de Graz dum kvin tagoj aperis reklamoj pri Esperanto, nia kongreso kaj Esperanto-kurso. Mi spertas tion kiel granda sukceso.*
*Al ĉiuj partoprenintoj de nia UK mi sincere dankas kaj esperas ke vi ĝuis la Esperantan etoson, kiun vi portis al nia belega urbo Graz.*
*Mia deziro por estonteco estas, ke Esperanto prosperu en la tuta mondo kaj multaj landoj sekvas nian paŝon cele al kultura heredaĵo.*
*Mi invitas vin al komuna fortostreĉo por ke fine UNESKO mondskale agnosku la Esperanto-kulturon kiel monda nemateria kultura heredaĵo.*

*Amike Ewald*

## La prezidanto de UEA kaj Maksimiliano Kolbe



La prezidanto de UEA, Fernando Maia jr. publikigis sur Fejsbuko jenan artikolon:Ĉi tiu foto estis farita post la fino de la 111-a Universala Esperanto Kongreso 2026 en Graz:. Ĉiutage mi promenis de la hotelo al la kongresejo, pasante la preĝejon Mariahilf survoje. En la lasta tago mi decidis viziti ĝin. Maksimiliano Kolbe (1894–1941), pola franciskano, martiro kaj patrono de esperantistoj, estis murdita en Aŭŝvico. Malliberigita de la nazioj, li proponis morti anstataŭ alia malliberulo, Franciszek Gajowniczek, kiu ankaŭ estis kondamnita al morto per malsato.
Inter la multaj aspektoj de lia vivo, estas nkaŭ ĉi tiu malgranda ligo, kiu proksimigas nin: Kolbe subtenis Esperanton kaj estas parto de la historio de esperantistoj. Tial ĉi tiu neatendita renkonto ŝajnis al mi agrabla maniero fini mian restadon en Graz.
Post semajno pasigita pripensante la nunon kaj la estontecon, kaj pri tio, kion ni, kiel tutmondaj civitanoj, povas fari por la socio, mi malkovris ĉi tiun ekzemplon de kuraĝo en nia historio. La sunfloro ĉe liaj piedoj ŝajnas perfekte kongrui kun tio, kiu li estis kaj kiu li estas.
Mi forlasas Gracon kun dankemo – kaj kun espero.




## KLUBVESPEROJ

Niaj klubvesperoj plue okazas je la unua lundo de la monato je la 19-a horo en la Klubhaus Lagergasse 98a. Ĉe la venontaj ni ne nur volas paroli pri gravaj aferoj kaj projektoj. Se vi havas ideojn por interesaj program-punktojn kiujn ni povas realigi, mi petas informi min.
**7**-a de **septembro**.
Je la vendredo **25**-a de **septembro** okazos la internacia **tago de la lingvoj** ĉe la Schloßbergplatz inter la 13-a ĝis 18-a horo.
**5**-a de **oktobro**
**2**-a de **novembro**
**7**-a de **decembro.**
Ni ĝojegas revidi vin post nia sukcesa kongreso en malnova vigleco. Kun koraj salutoj via Ewald.

# * *Impressum* *




Mitteilungsblatt des Grazer Esperanto-Vereines Esperanto-Societo Stirio „UNUECO“
Für den Inhalt verantwortlich:
Dr. Heinz-Paul Kovacic
Panoramagasse 3, 8010, Graz
Tel. 0664 3264027
heinz-paul.kovacic@aon.at

